JAARGANG 1 (4) Nr 7 JUNI 1936

# FLANDRA KATOLIKO

MAANDBLAD VAN HET KATHOLIEK VLAAMSCH ESPERANTO VERBOND
K. V. E. V.

I K U E

MONATA REVUO DE LA FLANDRA UNUIĜO DE KATOLIKAJ ESPERANTISTOJ
F. U. K. E.

REDAKTIE : TURNHOUTSCHE BAAN, 277, BORGERHOUT (ANT.)
INTERŜANĜ-ADRESO : F. U. K. E., TURNHOUTSCHEBAAN, 277, BORGERHOUT

## Sub la verda stelo

### ONZE EERSTE UITGAVE.

Het was een aangename verrassing op onze jaarlijksche vergadering, kennis te maken met onze eerste uitgave. Het beteekent een heele stap, waarover wij terecht fier mogen zijn. Het oogenblik van verschijnen was ook goed gekozen en het " Beknopt Leerboekje van de Wereldtaal „ zette als 't ware de kroon op het noeste werk van een gansch jaar. Dit boekje is als een vertrekpunt voor ons nieuwe jaar dat, we hopen het, met God's bijstand even verheugend en welgevuld moge zijn als dat welke reeds tot het verleden behoort.

Het bestuur rekent er nu ook op dat onze leden en bijzonder onze afgevaardigden niet zullen nalaten zich dit boekje aan te schaffen. U hebt het misschien niet meer noodig — daar U reeds Esperantist zijt — doch denk erom dat in uw kring er nog vrienden zijn die met een goed woord voor ons schoon ideaal te winnen zijn, en, daar kan U dit boekje een helpende hand voor toesteken. Pak er eens mede uit ; het is bijzonder opgevat om dienstig te zijn voor beginnelingen en niet-Esperantisten : eenvoudig, klaar en zoo beknopt mogelijk.

Daar wij op een groote afname rekenen, hebben wij er ook zulke hoeveelheid laten drukken, welke toelaat het boekje aan den prijs van slechts 2 frank te kunnen verkoopen.

Dit boekje hebben we laten drukken voor het goed en de vooruitgang onzer vereeniging en we rekenen er dan ook stellig op dat niemand in gebreke blijven zal. En wanneer U dit leest zult U misschien denken " goed gewerkt „, doch dit is niet genoeg, toont ons door een bestelling dat U ons steunen wilt. Denk ook niet " anderen zullen het wel doen „ doch zendt ons onmiddellijk uw postoverschrijving of het bedrag in postzegels en per keerende post ontvangt U het „ Beknopt Leerboekje van de Wereldtaal „, de eerste uitgave van het Katholiek Vlaamsch Esperanto Verbond. Wie een brief schrijft - onverschillig waarover - aan één onzer bestuursleden - moet er steeds enkele postzegels bijdoen ter bestelling van één of meer exemplaren van dit leerboekje.

## La katolika esperanta vivo

### LUITGARDE, HEILIGE DIETSE NON.

Het kampende, katholieke Vlaanderen vereert zijn helden en daarom ook zijn heiligen, want heiligen zijn helden ...

Deze maand brandt tussen de parallel van onze blikken de naam van Vlaanderen's schutsheilige : LUITGARDE. Zij is de reine witte vlam waarin de ontembaar strijdende jeugd het zwaard der zelfoverwinning harden kan. En hierom wordt zij door allen, in elke Dietse gouw, maar vooral in Vlaanderen, herdacht in dankbare trouw en genegenheid.

Ook door ons, Katholieke Vlaamse Esperantisten.

Omdat we katholiek en vlaams zijn, dat

spreekt van zelf, maar ook omdat we Esperantist zijn, en dat spreekt ook vanzelf, al is het wellicht minder luid...

Want indien we de wereldtaal als gemeenschappelijke hulpspraak betrachten dan is het toch ook voornamelijk :

— omdat we de volksontaarding willen beletten door de indringing van elke vreemde taal te verhinderen,

— omdat we elke volksgemeenschap gaaf en onverminkt willen bewaren, juist zoals God haar geschapen heeft.

Dat is het toch ook wat Luitgarde gewild heeft en hierin strookt onze overtuiging dus heelemaal met hare daad.

Zij immers is ons voorafgegaan op den weg die we nu betreden : de weg van de ware broederlijkheid, met de taal van de stilte heeft zij de innigste vrede verkondigd en elke wrijving tussen over-grense broeders vermeden.

En dat willen we haar nadoen met behulp van de wereldtaal, want Esperanto heeft thans dit gedaan, en alleen daarin bestaat heel onze vooruitgang : dat we nu spreken mogen waar we vroeger zwijgen moesten.

En daarom zien we in de H. Luitgarde, buiten de koene handhaafster van onze nationaliteit die in zwijgzaamheid Vlaanderen's trots heeft uitgejubeld, ook de onbewuste maar diepe incarnatie van ons ideaal.

H. Luitgarde, denk aan ons !

Seppe Scherpesteen.

## Literaturo

### JA KIAL POVAS NI NE.

Guido Gezelle

Ja kial povas ni ne,
amiko, kial do, kial ne
esti kiel floretoj,
florantaj ĉirkaŭ vi kaj mi ?
Ĉu unu radik', foliet',
nur unu branĉet', nur eta trunk',
en kiu ne havas Sinjor'
la propran volon kaj koron ?
Matene antaŭ tagiĝ'
ĝis la vespero malfrua,
ili staras, simpluloj, jen,
staradas kaj klinas kapeton
brilas laŭ Lia dezir',
ploras nur kiam Li ŝatas,
ridas - afabla ridet' -
mielo nek lakt' ĝin valoras !
La floretoj ! Vi, ho !
Floretoj la noblaj estaĵoj !
Ja kial povas ni ne,
amiko, kial do, kial ne
esti kiel floretoj,
florantaj ĉirkaŭ vi kaj mi ?

Trad. Tyneverum.

## Tra la Gazetaro

Ni denove altiras la atenton de niaj anoj kaj delegitoj sur la rimarkoj, kiuj aperis en nia antaŭa numero, sub la sama rubriko.

— De Bilzenaar : Waarom Esperanto ? - 12de Zomeruniversiteit I & II.

— Onze Gilde : Ni tie legis pri U.K.F.I. (Unuiĝo Katolikaj Flandraj Instruistoj).

— De Morgenpost : Pater Damiaan en Esperanto — Wat is Esperanto ? — La Fundamento — De 16 regels I & II — Het Esperanto-kongres te Gent.

— Nele : Het idee Wereldtaal — De voorloopers van Esperanto I; II; III; IV.

— De Volksstem van Aalst : Esp. Mentaliteit.

— Druivenland : (Hoeilaert) Waarom Esp. ?

— Katholieke Jongeren Vredesactie : Vertaling uit Aŭstria Esperantisto " Kial Esperanto ".

— Informa Bulteno de la Ruselara regiono : Kial ni lernu Esperanton.

## Nia movado

DONACOJN de 2 foje 10 fr. ni dankeme ricevis de du pastroj kaj dumkongrese sur nia tablo, malavara samkredanino, kiu ŝatas resti nekonata, metis koverton enhavante bileton po 10 Guldenoj. Tiu donaco estas vera Providenca helpo, ĉar ni iom timis ke je la fino de la eldonjaro ne plu estus eble al ni eldoni nian revuon pro financa malebleco. Do, nian plej varman dankon al la bonfarantino.

BIBLIOTEKO. — Novan libron " Historio de la Lingvo Esperanto " (parto I) ni ricevis kaj ege dankas la donacinton. Denove ni insiste petas niajn legantojn tuj resendi la librojn post legado. Ili sciu ke aliaj samideanoj ankaŭ ŝatas ricevi librojn.

NOVAJ MEMBROJ.

S-ro P. Vergauwen el Oppuurs.
S-ro L. Vermeiren el Deurne.
F-ino Simonis el Rotterdam.
F-ino Goedhart el Bergen-op-Zoom.
F-ino Remmers el Groningen.

« LA GRANDA REĜO ». — Samkredano el Breda, nome de Patro Joachim el Ginneken, Nederlando, donacis al nia Unuiĝo kelkajn libretojn « La Granda Reĝo ». Ni ilin tenas je la dispono de niaj anoj. Do faru demandon al la sekretariejo kaj ne forgesu post ricevo danki Patron Joachim.

ELTIRAĴO LETERO. — Fraŭlino L. Dandova, prezidantino de la Ligo Kat. Esperantista de Ĉeĥoslovakujo, Praha, Kostnické, wanv. 7 u. Ĉeĥosl., sendis al ni tre amikan leteron, el kiu ni ĉi-sube donas kelkajn eltiraĵojn : " ... Tial ni elkore gratulas vin pro via kuraĝa entrepreno kaj ni deziras al via agado multe da Dia beno en nomo de la ligo de Kat. Esp. en Ĉeĥoslovakujo. ... Ĉu vi bonvolus represi la adreson de la fervora kursgvidanto, S-ano Otto Màdo, Praha X, Zizkove 8. Ĉeĥosl., kiu serĉas adresojn por korespondemuloj de 10 — 25 jaroj ? Estas necese subteni precipe la korespondadon inter la junularo, el kiu kreskos niaj estontaj sekvantoj kaj kunlaborantoj.

... Lia Ekcelenco, D-ro Antonio Eltschkner, la helpepiskopo de Praha kaj nova honorprezidanto de nia Ligo estas tre ĝojigita kiam Li ricevis de ni informon pri via fervora agado. Li tre laŭdis la oferemon de la flandraj katolikoj. "

BRNO KONGRESO — La LKK de la Kat. Esp. Kongreso el Brno sendis la necesajn dokumentojn pri tiu kongreso kaj ankaŭ aliĝilojn enhavantajn ĉiujn dezirindajn informojn.

Ni petas tiujn anojn, kiuj intencas vojaĝi al Brno por kongreso, sciigi siajn nomojn, ĉu al la Prezidanto, ĉu al la Sekretario de nia unuiĝo ; por ke ili ricevu ĉiujn necesajn instruojn pri la reprezentado de nia FUKE.

JUNULARTAGOJ EN BRUGGE. — De la 24a ĝis la 29a de Aŭgusto okazos en Brugge internaciaj studo- kaj ludtagoj por la junaj Katolikaj Esperantistoj. Ĉi tiu provo estas la unua. Ni esperas sukceson. Ni komplete organizos la Katolikan junularan Esperantomovadon. Dum la studokunvenoj unu reprezentanto de ĉiu nacio, estos petata laŭtlegi raporton pri la stato de la junularmovado en sia lando.

La ludoj estos plej diversaj. Atletismo, piedpilko, k. t. p.

Ni starigos tendojn sur tereno de monaĥejo.

La 23an de Aŭg. okazos en Diksmuide la Izerpilgrimado. Tiuj kiuj jam estos alvenintaj, povas iri kun ni al ĝi. Por ili ni aranĝos specialan kunvenon dum kiu iu parolos pri la signifo de la Izerpilgrimado.

Ankaŭ knabinoj partoprenos. Ili loĝos en instituto. Por ili estos kelkaj specialaj programpunktoj. Kiu partoprenos tuj anoncu sin.

Kostoj : 7,5 Guldenojn aŭ 12 sv. frankojn.

Malaltigita prezo por grupoj.

Fernand Roose, 15, Guido Gezellelaan,
Brugge Vlaanderen (Belgio)
J. M. B. Elias, Schotersingel, 61,
Haarlem (N) (Nederlando).

RAPORTO FUKE-KUNVENO EN GENTO.

Ĉeestis 35 pers., inter kiuj 12 nederlandanoj. Pastro, D-ro J. De Coene malfermis la kunsidon per preĝeto. S-ro Calloens kiu malgraŭ familiaj malfacilaĵoj venis Genten inter du vagonaroj por prezidi nian kunvenon bonvensalutis la katolikajn Esperantistojn kaj petis la sekr. legi la jarraporton. Tiu ĉi komencis dirante ke la ĉefa fakto de la pasinta jaro estis la eldono de nia presita revuo Flandra Katoliko, kiu kvankam bonega ne estas sufiĉe ampleksa. Li esprimis la deziron ke la nova jaro vidu 8 paĝan revuon. La progreso de nia unuiĝo ni ankoraŭ ŝuldas al

la regula aperado de 120 artikoloj pri Esperanto kaj pri nia unuiĝo en 14 en- kaj eksterlandaj gazetoj. La vendado kontentige funkciis, kvankam multe da anoj ankoraŭ nenion aĉetis el nia vendejo. Menciite ankaŭ estis ke gramofondisko " La Espero „ kaj la " Tagiĝo „ estas je la dispono de niaj anoj kaj interesuloj por eventualaj paroladoj. Nia religia konsilanto en la normallernejo en Mechelen a. Maas ankaŭ gvidas kurson inter siaj lernantoj. S-ro Joz. Cammaert el Ste Mariaburg nuntempe gvidas la skribajn kursojn. Antaŭe tiu fako estis estrata de S-ro Paesmans kiu pro troa okupo ĝin transdonis. Jen kelkaj punktoj el la raporto pri la kursoj. La nombro de la kursistoj jam atingas 50. 5 personoj ricevis diplomon. Ĝis nun pli ol 100 leterojn la kursgvidantoj ricevis de la kursanoj. La nombro de la kursanoj de S-ro Cammaert estas 15 (1 pastro, 1 religiulino, 1 instruistino, kaj 10 geoficistoj). Ĉeh-kurso ankaŭ okazis en Antverpeno, por 14 katolikaj geinstruistoj, pere de kiuj ni esperas organizi sekvantan vintron proprajn kursojn en Antverpeno kaj ĉirkaŭaĵo. Momente ni haltis la legadon de la raporto je la anonco de la morto de nia limburga ano, S-ro Gerard Geukens el Hasselt. Ni diris fervoran preĝeton je lia animripozo. Okazis du kunvenoj en Antwerpen. La biblioteko kontentige funkciis. Kelkaj bonfarantoj al ni sendis librojn. Kiel ĉefa okazintaĵo ni menciu la aperon de nia unua eldono : " Beknopt Leerboekje der Wereldtaal ". La verkisto, kiu tamen ŝatas resti nekonata estis ege gratulata kaj post la kunveno almenaŭ ĉiu ĉeestanto aĉetis ekzempleron. Ni esprimis la deziron ke niaj delegitoj speciale prilaboru la disvendadon de tiu libreto kaj ni proponis sendi al ili 20 ekzemplerojn. La prezo estas nur 2 Fr. (rabato por granda kvanto). La raporto ankaŭ anoncis la nunan kompiladon de propra preĝareto " Nia Preĝareto „ al kiu laboras Pastroj Beckers, Dumoulin, Van Hoogstraeten, kaj De Mayer, S-roj Calloens, Vermuyten, Paesmans. Ĝi estos internacie verkita por ke eksterlande en katolikaj medioj ni trovu aĉetantojn. Ni ankaŭ decidis partopreni al la Kat. Esp.- Ekspozicio en Brno. Niaj planoj por la estonta jaro estas vastaj. Ni intencas disvastigi nian unuiĝon pere de nia F.K. kaj decidis, laŭ permeso de la Prezidanto de IKUE partigi nian unuiĝon en 2 sekcioj. La unua estos KVEV, kies anoj pagos kiel kotizon 10 fr.. Tiu sekcio enhavas la neesperantistojn, la Hon. Mjn kaj simpatiulojn, kies nomoj ne aperos en la IKUE-jarlibro. Ni tamen esperas ke iom post iom ili transpasos al la dua sekcio FUKE kies membroj pagos 15 fr. La celo kaj kialo de tiu aranĝo estas ke ni devas nepre finance aranĝi nian unuiĝon. Kompreneble la necesa eldono de F. K. jare postulas proksimume 3000 fr. kaj malgraŭ la anoncoj kaj la kotizoj ni ne povas eviti deficiton per la nuna agmaniero. Kiam en aliaj organizaĵoj similaj la anoj pagas la trioblon eĉ la kvaroblon de nia kotizo ni fidas je la simpatio de niaj Fuke-anoj por ke ili volonte pagu sumon kiu eĉ ne estas la duoblo de la malnova kotizo. La anoncoj ne sufiĉe donas kaj ni ne spertis la atenditan helpon kaj sukceson. En tiu direkto ni tamen daŭrigu niajn klopodojn kaj ne forgesu ke la anoncoj ne estas neglektinda helpo. Samtempe niaj anoj ankaŭ estas instigitaj de tempo al tempo pensi pri nia vendejo. Ni ankaŭ intencas organizi Verdan Semajnon, komence de Septembro. La sekvanta F. K. donos pluajn novaĵojn pri la aranĝoj. La raporto je la fino faris alvokon por ke per unueca laboro ni antaŭeniru kaj plifortigu nian unuiĝon je la honoro de Dio kaj por la bono de la Kat. Esp. movado.

**Kasista raporto.** Pro manko de loko ni publikigos la interesan kasistan raporton en num. 8.

REVUOJ. — Ensenditaj kaj je la dispono de niaj anoj :

Nederl. Katoliko (Majo) - Haga Kat. E. (Majo)
Informilo Kat. Esperantistoj ĉeĥoslovakaj
La Internacio de Militrezistantoj
Ĉeĥoslovaka Radio-Bulteno n° 7
Komunikoj de la 28a Univers.E. kongreso
Informa Bulteno de la ruselara regiono (n° 36)